
ĈEFARTIKOLO

# La stela scio

## de antikva popoloj - de Grekio ĝis Ĉinio

Bill M. Mak – Honkongo/Kanado

*Antikvaj popoloj observis la astrojn pro diversaj kialoj – lerni pri la sezonoj por terkulturado, noti tempon, interpreti ties signifojn ktp. La antikvaj ĉinoj kaj la baratanoj aparte interesiĝis pri la luno kaj observis ĝian movadon antaŭ la steloj.*



La 28 ĉinaj "lun-haltejoj"

### Luno, suno kaj steloj

Ĉiutage, malgraŭ sia okcidenta moviĝo pro la tera rotacio, la luno fakte iom orienten progresas kaj troviĝas antaŭ malsamaj stelaroj, kiuj nomiĝas *nakṣatra* en la sanskrita aŭ *xiu* en la ĉina. Ĉar la luno moviĝas tra la ĉielglobo en ĉirkaŭ 27,3 tagoj (= sidera monato), troviĝas 28 xiu-oj aŭ "lunaj haltejoj"; en Barato, ambaŭ sistemoj de 27 kaj 28 *nakṣatr*-oj ekzistas. Tiel la antikvaj ĉinoj kaj baratanoj ekdividis la ĉielon laŭ la lunmovado.

Ankaŭ la babilonianoj dividis la ĉielon, ne laŭ la luna movado sed laŭ la suna movado. Ankaŭ la suno orienten progresas kiel la luno, sed multe pli malrapide. En unu suna jaro la suno revenas pli-malpli al la samaj steloj; ĉiumonate la suno orienten progresas dekduonon de la ĉielglobo aŭ 30 laŭ la ekliptiko. La proksimaj stelaroj, kiuj troviĝas en tiuj dekduonoj fariĝis la zodiako. Tiun ĉi sistemon la greka popolo prenis de la babilonianoj. Laŭ la originala ideo, kiam oni diras ke iu apartenas al la signo ekz. Leono, tio signifas ke la persono naskiĝis je la momento kiam la suno troviĝis en tiu zodiaka konstelacio. Pro diversaj kialoj kiujn mi klarigos sube, tio ne plu ĉiam validas.

### La Planedoj

En la greka, la vorto *planedo* signifas *vaganto (planētēs)*. Malkiel aliaj steloj, kiuj ĉirkaŭiras la teron sufiĉe regule, la planedoj moviĝas antaŭ la steloj, foje ankaŭ neregule. Por la antikvaj popoloj, kiuj supozis ke la tero ne moviĝas, la planedoj, kiuj inkludas la sunon kaj la lunon, certe havas apartajn trajtojn. Laŭ ties rapideco, jen la listo de sep planedoj naskiĝas: Luno, Merkuro, Venuso, Suno, Marso, Jupitero, Saturno. Nature, ili imagis ke la luno plej proksime ĉirkaŭiras kaj Saturno plej malproksime. Jen naskiĝis la greka tercentra kosmo, kiun okcidentanoj konis ĝis Koperniko. Ankaŭ la ĉinoj kaj hindoj konis ankaŭ la planedojn, sed iel la tercentra modelo ne naskiĝis en ties imagoj.



Araba horoskopo

### La Planeda Semajno

Preskaŭ ĉiuj antikvaj popoloj iel adoris la planedojn. La maniero de la antikvaj egiptoj estas tamen iom aparta: ĉiuhore oni adoras malsamajn planedojn. Alivorte, ĉiuj planedoj laŭorde fariĝis reĝdio de la horo. Se oni komencas per Saturno, kiu estas la plej malrapida kaj malproksima por la unua horo, je la dudekkvara horo estas Venuso. Tial je la unua horo de la sekvanta tago, estas la Suno. Ĉar la planeda reĝdio de la tago estas same kiel la reĝdio de la unua horo de la tago, disvolviĝas la jena listo de reĝdiaj planedoj: Saturno, Suno, Luno, Marso, Merkuro, Jupitero kaj Venuso. Tiu ĉi ordo fariĝis la bazo de nia nuna koncepto de semajno, kvankam la semajno kutime komenciĝas ekde Dimanĉo (suno) jam tre frue, laŭ la latinaj aŭtoroj en la 2a jarcento.

La koncepto de planeda septaga semajno disvastiĝis de Grekio ĝis Barato iam antaŭ la 2a jarcento. Poste, pere de Budhismo, iam antaŭ la 8a jarcento, la ideo disvastiĝis ĝis Ĉinio kaj poste ankaŭ al Japanio kie la planeda semajnsistemo estas uzata ĝis nun. La ĉinoj tamen ne akceptis la sistemon ĝis la 20a jarcento, kiam la sistemo fariĝis internacia normo.




Jarcenta tercentra modelo de la kosmo

### La Horoskopoj


La scioj pri la planedoj kaj la suna movado kunfandiĝis kaj fariĝis la bazo de la ideo de horoskopo. La vorto horoskopo signifas la observanto de *hōra* en la greka. Sed kio estas *hōra*? *Hōra* havis diversajn signifojn: kiel tempounuo, ĝi estas "horo"; astrologie, tio estas la leviĝanta zodiaka konstelacio je la momento de sunleviĝo de iu tago. En nia nuna lingvaĵo, se oni demandus kio estas via zodiaka signo, la respondo dependas de la naskiĝtago. Laŭ la "sidera horoskopo", la zodiako estas ja la stelaro kie troviĝis la suno en la naskiĝtago. La dek du zodiakaj signoj komenciĝas per Arieso, kiu estis la astronomia pozicio de printempa ekvinokso dum la antikva tempo (2000 A.K – 100 P.K.). Tiun ĉi sistemon uzas ankoraŭ nun la baratanoj.

Sed pro la astronomia fenomeno, kiu nomiĝas precesio, la pozicio de la printempa ekvinokso okcidenten moviĝas. Ĉi-momente tiu punkto troviĝas en la signo Fiŝoj. La okcidenta horoskopo, kiu baziĝas sur la greka, sekvas ne la sideran difinon sed la ekvinoksan difinon. Pro tio, la horoskopaj signoj ne plu kongruas kun la stelaj signoj en la ĉielo. Tiu ĉi sistemo nomiĝas tropika horoskopo. Astronomie ambaŭ sistemoj kaptas nur parton de la originala sistemo: la unua – la stelojn, la dua – la astronomian difinon.

La horoskopo, kiel la planeda semajno, disvastiĝis al Ĉinio kaj Japanio ankaŭ pere de Budhismo. En la 6a jarcento aperis ĉina traduko de budhisma sutro, kiu nomiĝas *Mahāsaṃnipātasūtra*, kie troviĝas la sanskritaj nomoj de la dek du zodiakaj signoj. Komence la ĉinoj ne komprenis la ideon de horoskopo, sed iom post iom ĝi disvastiĝis en Ĉinio ekde la 8a jarcento dank' al la disvastiĝo de esotera budhismo. Tamen pro la forteco de la tradicia ĉina numerologia divenado, la horoskopo neniam fariĝis populara.

La horoskopo alvenis en Japanion en la 9a jarcento kune kun la esoteraj budhismaj tekstoj. Ĝi fariĝis tre populara pro la sukceso de esotera budhismo en Japanio. Bedaŭrinde, la japanaoj, same kiel la ĉinoj, ankoraŭ ne komprenis la kalkuladon de planeda movado, kiu estas necesa por fari horoskopon, la "scienco" de horoskopa astrologio pereis en Japanio iam post la 12a jarcento, kiam mankis al la budhismaj astrologoj la metodo kalkuli la ĝustajn poziciojn de la planedoj. ■

| Planedo | Tago en E-o | Latina (dies_) | Sanskrita (_vāra) | Angla | Franca | Germana | Ĉina/ Japana |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Suno | dimanĉo | Sōlis | āditya | Sunday | dimanche | Sonntag | 日(suno) |
| Luno | lundo | Lūnae | soma | Monday | lundi | Montag | 月(luno) |
| Marso | mardo | Martis | aṅgāraka | Tuesday | mardi | Dienstag | 火(fajro) |
| Merkuro | merkredo | Mercuriī | budha | Wednesday | merkredi | Mittwoch | 水(akvo) |
| Jupitero | ĵaŭdo | Jovis | bṛhatspati | Thursday | jeudi | Donnertag | 木(ligno) |
| Venuso | vendredo | Veneris | śukra | Friday | vendrede | Freitag | 金(metalo) |
| Saturno | sabato | Saturni | śanaiścara | Saturday | samedi | Sonnabend Samstag | 土(tero) |




Ĉina horoskopo



**Rimarkoj:**

Bill M. MAK instruas sanskriton kaj budhisman filologion en la Universitato de Honkongo.






# KONTAKTO

ISSN 0023-3692

numero 250 (2012:4)

## El Ĉinio
Fremdlandanoj en hutongoj de Pekino

## Lingvoj
La pirahanoj kaj la matematiko

## NKD
Kiam Eŭropo ne baniĝis



# La stela scio
## de antikvaj popoloj ĝis nun



Eterne Rima: Tute nova hiphopa historio

# ESTU KUN TEJO EN 2012

## KOTIZTABELO DE UEA POR 2012

**La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2012**

| Lando/valuto | MG | MJ(-T) | MA(-T) | SA | Kto | SZ |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio/dolaro | 14 | 34 | 85 | 51 | 31 | 170 |
| Aŭstrio/eŭro | 10 | 25 | 61 | 38 | 23 | 122 |
| Belgio/eŭro | 10 | 25 | 61 | 38 | 23 | 122 |
| Brazilo/eŭro | 5 | 12 | 31 | 19 | 11 | 62 |
| Britio/pundo | 8 | 21 | 52 | 33 | 20 | 104 |
| Ĉeĥio/krono | 170 | 420 | 1050 | 670 | 400 | 2100 |
| Danio/krono | 70 | 180 | 450 | 285 | 170 | 900 |
| Estonio/eŭro | 7 | 17 | 42 | 27 | 16 | 84 |
| Finnlando/eŭro | 10 | 25 | 61 | 38 | 23 | 122 |
| Francio/eŭro | 10 | 25 | 61 | 38 | 23 | 122 |
| Germanio/eŭro | 10 | 25 | 61 | 38 | 23 | 122 |
| Greklando/eŭro | 8 | 20 | 50 | 32 | 19 | 100 |
| Hispanio/eŭro | 10 | 25 | 61 | 38 | 23 | 122 |
| Hungario/forinto | 1750 | 4400 | 11000 | 7000 | 4200 | 22000 |
| Irlando/eŭro | 10 | 25 | 61 | 38 | 23 | 122 |
| Islando/eŭro | 10 | 25 | 61 | 37 | 22 | 122 |
| Israelo/eŭro | 7 | 18 | 46 | 28 | 17 | 92 |
| Italio/eŭro | 10 | 25 | 61 | 38 | 23 | 122 |
| Japanio/eno | 1120 | 2800 | 7000 | 4200 | 2520 | 14000 |
| Kanado/dolaro | 13 | 34 | 84 | 50 | 30 | 168 |
| Latvio/lato | 4 | 11 | 27 | 17 | 10 | 54 |
| Litovio/lido | 20 | 50 | 130 | 80 | 50 | 260 |
| Nederlando/eŭro | 10 | 25 | 61 | 38 | 23 | 122 |
| Norvegio/krono | 75 | 190 | 470 | 280 | 170 | 940 |
| Nov-Zelando/dolaro | 18 | 44 | 110 | 66 | 40 | 220 |
| Pollando/zloto | 26 | 64 | 160 | 100 | 60 | 320 |
| Portugalio/eŭro | 8 | 20 | 50 | 32 | 19 | 100 |
| Rusio/eŭro | 5 | 12 | 31 | 19 | 11 | 62 |
| Slovakio/eŭro | 7 | 17 | 42 | 27 | 16 | 84 |
| Slovenio/eŭro | 8 | 20 | 50 | 32 | 19 | 100 |
| Svedio/krono | 88 | 220 | 550 | 350 | 210 | 1100 |
| Svislando/franko | 12 | 30 | 75 | 45 | 27 | 150 |
| Usono/dolaro | 13 | 32 | 80 | 48 | 29 | 160 |
| TARIFO A/eŭro | 6 | 16 | 41 | 25 | 15 | 82 |
| TARIFO B/eŭro | 5 | 12 | 31 | 19 | 11 | 62 |

**ALIAJ LANDOJ:** Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

**TARIFO A:** Bahamoj, Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

**TARIFO B:** Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

**MG:** Membro kun Gvidlibro kaj monata reta novaĵbulteno.

**MJ(-T):** Membro kun Jarlibro kaj la revuo Esperanto rete (kaj ĝis inkl. 29 jaroj membro en TEJO kun Kontakto sen plia pago).

**MA(-T):** Membro-Abonanto kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto.

**DM(-T):** Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto.

**DMJ(-T):** Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membrecon en TEJO kun Kontakto.

**SA:** Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA.

Kto: Abono al la revuo Kontakto, sen la membreco en UEA/TEJO.

**SZ:** Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA).

**PT:** Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

**MJ(-T):** MEMBRO KUN JARLIBRO KAJ LA REVUO ESPERANTO RETE (KAJ ĜIS INKL. 29 JAROJ MEMBRO EN **TEJO** KUN **KONTAKTO** SEN PLIA PAGO).

**MA(-T):** MEMBRO-ABONANTO KIEL **MJ(-T)** PLUS LA REVUO ESPERANTO.

**Kto:** ABONO AL LA REVUO **KONTAKTO**, SEN MEMBRECO EN UEA/TEJO.

**PT:** PATRONO DE **TEJO**: POR SUBTENI **TEJO** (NE INKLUZIVAS MEMBRECON); RICEVAS LA REVUON **KONTAKTO** KAJ ALIAJN ELDONAĴOJN DE **TEJO**.

tejo MOJOSAS

www.tejo.org

KONTAKTO

Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA).

Fondita en 1963.

**N-ro 250 (2012:4),** 49-a jarkolekto

**ISSN** 0023-3692.

**Legata** en ĉ. 90 landoj.

**TTT-paĝo: http://kontakto.tejo.org**.

**Eldonanto (administrado, abonoj, anoncoj): UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@co.uea.org>.

**Redakcio:** Kontakto, Rua José Guidini Jr, 229, Ribeirão Preto, SP. Brazilo, 14093-540 <kontakto@tejo.org>

**Redaktoro:** Rogener Pavinski

**TEJO-Tutmonde:** SZILVA Szabolcs

**Enpaĝigo:** Romulo Felício

**Korektado:** Rob Moerbeek

**Presado:** Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), <skonpres@poczta.onet.pl>

**Konstantaj kunlaborantoj:** Aleksander Osincev (Rusio), Sergey Tyirin (Israelo), Alexandre Baudry (Francio), Gabriel Osho-Davies (Niĝerio), Victor Solé (Katalunio), Simmon K. Barney (Usono), Etsuo Miyoshi (Japanio), Ivo Miesen (Nederlando), Vasile Gavrilan (Moldavio), Olga Ŝilajeva (Rusio). Facillingvaj artikoloj estas verkitaj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo troviĝas en nia retpaĝo.

**Anonctarifo:** tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas makleraĵon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA.

**Anoncetoj:** por Anonctabulo 0,25 EUR por unu vorto. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA.

**Abontarifo:** Varias laŭlande. Kontrolu ĉe nia retejo.

**Malfortvidantoj:** Estas kelkaj voĉlegitaj artikoloj en nia retejo. Pliajn oni povas peti de Vasile Gavrilan <pangavrilan@gmail.com>. Kasedlegantoj sendu po du kasedojn de 90 minutoj al Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, Nederlando. Kun la poŝta glumarko de "Cécogramme" (viro kun blanka bastono).


**Kontakto en radioj:** Radio 3ZZZ: http://www.3zzz.com.au/

**ĜD Edukado kaj Kulturo**

Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la Eŭropa Komisiono. La publikaĵo tamen reflektas nur la vidpunkton de la unuopaj aŭtoroj, kaj la Eŭropa Komisiono neniel respondecas pri ajna uzo de la informoj.

***"La opinioj de la unuopaj aŭtoroj kaj de la redaktoro ĉi tie esprimitaj ne nepre spegulas la opinion de TEJO aŭ UEA, kiuj ne respondecas pri ili".***

## Redakcie



*Saluton estimataj legantoj!*

*Se vi bone atentis, la nuna numero, kiun vi havas ĉemane estas io speciala.*

*Temas pri la la numero 250 de Kontakto. Jam 250 eldonoj de nia gazeto venis en la mondon! Gratulon al ni ĉiuj, kiuj vivigis ĝin 250 fojojn! Festinda okazo, kiu nur ne estas pli granda ĉar alia speciala okazo jam tre proksimas. Venontjare ankaŭ estos festinde ĉar Kontakto iĝos 50-jara revuo! Multaj novaĵoj estas planataj por tiu okazo kaj ni tre esperas ke ni sukcesos realigi ilin ĉiujn!*

*Certe vi jam fojfoje, ĉu en kamparo aŭ en iu alia kvieta loko atente miris la ĉielon nokte. Steloj, konstelacioj kaj galaksioj montriĝas plene en la ĉiela ebenaĵo. De miliardoj homoj rigardis en la ĉielo kaj provis deĉifri per ili la surteran vivon. La steloj rakontas historion – la stela scio estas la temo de niaj ĉefartikoloj. Astronomie aŭ astrologie, la stela scio influas rekte nian vivon. Legu la artikolojn de Olga Ŝilajeva kaj Bill Mak por scii pri pli la rilato inter la steloj kaj niaj tagoj, semajnoj kaj monatoj. Se vi ankaŭ deziras profundiĝi en la stelesploradon, per la artikolo de Ramón Morales vi ekkonos ilojn por tion fari.*

*Eble vi ne kutime aŭskultas aŭ eĉ ne ŝatas hiphopan muzikon, sed la laboro de Igor Wasilewski meritas nian atenton. Eterne Rima – lia hiphopa personeco – estas talenta kaj vigla artisto, kiu fakas pri elektronika muziko, ĉefe pri hiphopo, muzikstilo, kiun li helpis popularigi en Esperantio. Kun nova albumo antaŭnelonge lanĉita, li estas nia intervjuato ĉi-eldone.*

*Ĉu vi konas iun lingvon en kiu mankas vortoj por nombroj kaj numeroj? Ĝi ekzistas: La pirahana lingvo – vi, kiu scias kalkuli legos pri ĝi sur la paĝo 20. El Ĉinio venas raporto pri la tradiciaj hutongoj en Pekino. Konstruaĵoj, kiuj nun taŭgas por gastigi fremdlandanojn.*

*Ĉar ĉi-foje mankas facillingva artikolo, ni anstataŭigis ĝin per tre facila recepto de avenaj biskvitoj! Dum vi frandas ilin, vi plue legu la artikolon pri la stranga kutimo de niaj antaŭuloj, kiuj ne tre multe ŝatis baniĝi; la recenzojn pri ĵus aperintaj muzikaj KD-oj; la blagan blogon, en kiu eĉ mi mem partoprenis la blo(bla)gaĵon kaj la novaĵojn pri nia junulara movado en TEJO-Tumonde.*

*Bonan legadon!*

*Rogener PAVINSKI*

## ENHAVO

**Reagoj, Informe, Temo-sugestoj** ____ 4
**Intervjuo** Eterne rima: Tute nova hiphopa historio ____ 5
**La blaga blogo** Blogo de eksterterano ____ 9
**Ĉefartikolo** La stela scio: de antivaj popoloj ____ 10
Kalendaroj: ĉu dimanĉo aŭ lundo? ____ 12
Stellarium: Mojosa planetario en via komputilo! ____ 14
**Recepto** Biskvito el aveno ____ 15
**NKD** Kiam Eŭropo ne baniĝis ____ 16
**Recenzo** ____ 17
**El Ĉinio** Fremdlandanoj en hutongoj de Pekino ____ 18
**Lingvoj** Ĉu eblas vivi sen nombroj? ____ 20
**TEJO tutmonde** ____ 21